434 | Marto 2017

Ĉu vi ne vidas ĝuste la mesaĝon? Rigardu ĝin en via retumilo.

Por ĉiutagaj informoj, eventoj kaj interesaj enhavoj, sekvu ankaŭ nian paĝon ĉe Facebook kaj Twitter.

---

# Ekkonu kaj partoprenu la Internacian Junularan Kongreson 2017

Kiel probable vi jam scias, ĉi-jare IJK okazos por la unua fojo en **Afriko** kaj precize en **Aneho**, **Togolando**. La temo de la 73'a IJK estas "**Virinoj kaj viroj kun siaj kulturoj**". Jam nun eblas aliĝi kaj koni la lokon kaj baldaŭ la programon de la festivalo per ĝia retejo.
Ni ĝojas ankaŭ prezenti al vi tri alvokojn por partopreni subtenate de TEJO.

Limdato por kandidatiĝi estas la **21'a de Aprilo 2017**.

1. Partoprenu la IJK'n helpita de TEJO kadre de Eŭrop-Afrika Junulara Kapabligo
2. Fonduso: Partoprenu IJK'n – por ekstereŭropunianoj kaj eksterafrikanoj
3. Partoprenu IJK'n – speciala okazo nur por afrikanoj

Se vi ne jam faris, konsideru partopreni la **monkolekton** por helpi venigi Afrikanojn al la festivalo, via helpo ja bezonatas kaj aprezatas.

---

# TEJO partoprenis en Tutmonda Festivalo de Ideoj por Daŭripova Evoluo

**TEJO** partoprenis al **Tutmonda Festivalo de Ideoj por Daŭripova Evoluo** organizita de **Unuiĝintaj Nacioj**, kiu okazis de la 1'a ĝis la 3'a de Marto en Bonno, Germanujo. La evento celis pridiskuti la plej taŭgajn kaj efikajn kielojn atingi la **17 daŭripovajn celojn** en la 2030'a Tutmonda Tagordo de Unuiĝintaj Nacioj. Legu pri la evento sur nia retejo.

La partoprenintoj komponante per-papere la ŝildon de la 17 daŭripovaj celoj

---

# Amikumu havas novan retejon kaj eniris la betan fazon

Nova retejo de *Amikumu* estas lanĉita, ĝi havas nuntempe tradukojn en **8 lingvoj**: Esperanta, Angla, Hispana, Franca, Pola, Nederlanda, Germana kaj Portugala. Ekde de tiu ĉi monato la projekto atingis la **betan fazon**, tio signifas ke ĉiuj kiuj subtenis la projekto per Kickstaster donante 9 Eŭrojn rajtas elŝuti la betan aplikaĵon kaj testi ĝin por Esperanto. Aliaj lingvoj estos disponeblaj ekde Julio.

---

# JozefoVlogs, la nova Esperanta videoblogisto

La videoblogisto Josefo dum unu el siaj videoj

Esperantujo havas novan talentan videoblogiston, **Josefo**, kiu per sia Jutuba kanalo publikiĝis jam 13 ĝuindajn videojn kaj havas pli ol ducent abonantojn. Ariel ne maltrafis la okazon kaj intervjuis por vi tiun Hispanan Jutubeman knabon. La **tuta intervjuo** legeblas ĉe nia retejo ĉi tie.

---

## Venontaj Eventoj dum Marto kaj Aprilo

- PEKO – Printempa Esperanto-Kunveno 2017 – 24'a-26'a de Marto, Belgujo
- Internacia Junulara Festivalo - 12'a-18'a de Aprilo, Italujo
- Krokodila Renkontiĝo 2017 - 28'a de Aprilo-1'a de Majo, Francujo
- 4-a Centrejo - 28'a de Aprilo-1'a de Majo, Ĉeĥujo

---

# Tradukantoj bezonatas!

Nia bela lingvo Esperanta estas ilo por prizorgi **lingvan diversecon** kaj por ke tio veru, ni bezonas **tradukemulojn**, kiuj helpu traduki (kaj retraduki kie bezonate) la TEJO-retejon kaj baldaŭ la bultenon kaj la retejon por JAE.
**JAE (Junaj Amikoj de Esperanto)** estas speciala kategorio formata ĉefe da interesitoj pri Esperanto sed kiuj ankoraŭ ne parolas la verdan lingvon, pro tio atingi ilin propralingve estas eĉ pli grave.

Se vi interesiĝas, signalu vian emon per mesaĝo al **tradukado@tejo.org**

---

**Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO Aktuale?**
Sendu viajn novaĵojn al tejoaktuale@tejo.org antaŭ la lasta tago de la monato.
Antaŭdankon pro la helpo!

---

## Kolofono

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Alessandro Bonfanti
**Kontribuantoj de ĉi tiu numero:** Ariel Palmer, Enric Baltasar

**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), tejo.org

*Kopirajto © 2017 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno